Laŭzana Esperanto-Societo
Januaro 2021 - n-ro 01

# Laŭzana informilo

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 1-an de februaro *Ĝenerala Asembleo*
- Lu, la 1-an de marto *Decidota*
- Lu, la 5-an de aprilo *Decidota*
- Lu, la 3-an de aprilo *Decidota*

## Lunde, la 4-an de januaro 2021,
### je la 20-a ĉe Knud kaj M.-Antoinette Sunier en Montreux
## Cléa Robin malkovrigos al ni
# « La Danco$_n$ de la Energio »

*Letero al la atento de Gimnaziestro, ie ajn en Francio. (01.11.2020)*

Sinjoro,

Kiel patrino de Maria, mi anoncas al vi, ke ŝi tuj eliras sian lernejon. Persone mi profesoris dum 16 jaroj, tiel mi neniam pensis elirigi ŝin de la *Instruado publika*.

Mi ne komprenas kiel vi mem kaj la instruistaro povas, ekde septembre, kaŭcii tiujn disfunkciadojn kaj mistraktadon gravegan.

Kiel vi kuraĝas alvoki infanon al via oficejo, ĉar ŝi aŭdacis manĝi en la manĝejo apud amikino? Kiel vi povas toleri, ke instruistino histerie krias, kiam ŝi rimarkas, ke studento portas la maskon sub la nazo, ĉar li ne plu povas spiri? Kiel vi povas toleri, ke la studentoj ne plu povas purigi sian nazon? Kiel vi povas toleri, kiam mia filino havas kapturnon pro hipoksio, aŭdi la instruiston diri, ke ne estas problemo pro la masko, sed ke ŝi *"havas problemojn en sia cerbo"?*

Kiel vi povas toleri instruiston diri: *"Vi ne rajtas diskuti pri decidoj faritaj aliloke?"* Kiel vi povas toleri, ke instruisto enklase akuzas mian filinon esti la kaŭzo de la estonta morto de ŝiaj geavoj? Kiel vi povas toleri, ke studentoj kondutas kiel fi-denunc-istoj?

Estas nur kelkaj frene-zaj ekzemploj. Tiuj mis-funkcioj rezultigas, ke mia filino estas nun en etos-lerneja fobio.

Mi lasas vin fronte al via konscienco.

Miajn civitajn salutojn. fr

## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2020**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

**Babiladaj Rondoj**

ambaŭgrupe, je la 19-a:

**Ve, la 15-an de januaro**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 / 079 393 32 63

**Ve, la 29-an de januaro**
ĉe Francisko Randin
Vallombreuse 14, Laŭzano
021 647 29 28 / 076 411 14 55







Tiu rakonto estas en libreto de 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.




Verkistoj:
Charlotte Blanc Maillard
Pierre Boizot
Pierine Bonjour
Gilbert Darbellay
Denis Maret
François Randin
Elisabeth Renaud
Cléa Robin
Markus Sanz
Rosario Scopelliti
Knud Sunier
Marie-Antoinette Sunier
Paulette Weyeneth
kun la helpo de Nancy Fontannaz






# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio A, parto 1*

«Iam…» - tiel komenciĝas tiu terura rakonto. Amiko mia, kiu loĝas en Kanado, decidas ferii en nia regiono kun sia edzino. Li sendas al mi leteron por informi min pri la datoj de sia vojaĝo. Mi do respondas al li, ke mi ĝojas revidi lin kaj lian edzinon. *«Mi iros en la flughavenon por bonvenigi vin.»* Mi notas lian alventagon kaj horaron en mian agendon: *«Dum miaj libertagoj mi plezure vizitigos vidindaĵojn de nia regiono.»* En la letero li parolas al mi pri restoracio apud la lago sude de mia urbo, kiun li absolute volas koni. Kial *"absolute"* … mi ne vere komprenas kial. Ĉu estas specialaĵoj por manĝi tie? Mi decidas atendi renkonti lin kaj esti vidalvide de li por ricevi pli da klarigoj.

Do, la antaŭviditan daton, mi alvenas al la flughaveno kaj atendas lian aviadilon. Tiun tagon pluvegas kaj ventegas. Mi vidas, ke la aviadilo balanciĝas antaŭ tuŝi teren. Estas iomete angore, sed la piloto tre bone estras la stiradon kaj la flugmaŝino trankvile haltas antaŭ la alvendomo.

Kelkminutojn pli malfrue mi renkontas mian amikan paron. Li mem estas ankoraŭ tre pala pro sia timo dum la vojaĝo. Sed lia edzino estas ridanta.

Ni veturas hejmen kaj survoje li rakontas al mi, ke li legis en esotera gazeto novaĵon pri strangaj aperaĵoj apud aŭ en nia lago. La paro ĝojus viziti tiun lagon kaj tute konsentas malkovri samtempe niajn bonajn specialaĵojn. Sed li ankaŭ esperas ricevi klarigojn pri tiu mistero.

Tiun historion mi svage aŭdis sed mi kredas, ke temas pri artikolo de ŝercemulo. Dum la veturado mia amiko rakontas, ke troviĝas restoracio borde de la lago Lemano, en kiu iam oni vidis ion, iun aĵon misteran. Feliĉe li kunprenis la gazeton en sia valizo. Do mi promesas helpi lin partopreni en tiu esplorado, ĉar mi havas kelkajn liberajn tagojn.

Mi pensas, ke la sekvantaj horoj promesas esti pasiaj. Mi ĝojas legi tiun artikolon, kiu intrigas min. Ankaŭ min interesas misteroj. Do, ni alvenas hejmen. Mi instalas miajn amikojn komforte. *«Ripozu momenton»,* mi diras al ili, *«dum mi preparas trinkaĵojn kaj kukon. Poste ni povos diskuti kaj fari planon por la venontaj tagoj.»*

Pli poste ni retrovas nin en mia manĝoĉambro. Mia amiko alportas la esoteran gazeton kaj tuj mi legas la artikolon. La verkinto parolas pri iu sovaĝa loko inter Ĝenevo kaj Laŭzano, kie troviĝas izolita restoracio, ĝuste borde de la lago. Tie eblas manĝi specialaĵojn kaj ĝui mirindan vidon al la Lemanaj akvoj. La artikolo pluiras tiel: *«Kiam la klientoj tage sidas ene, ĉio normalas, sed nokte kelkaj rakontas strangajn fenomenojn. Ili povas vidi fosforeskajn neklarigeblajn lumetojn aperi kaj malaperi super la akvo.* ***Iafoje,*** *ĉefe kiam la luno plenas, iuj klientoj rimarkis nedifinitajn grizajn formojn, kiuj ŝajnis danci sur la lago kaj subite plonĝi en la akvon.»*

# Intervjuo de Paulette Noëlle Weyeneth, fidela membro de LES

(Fare de Francisko)



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Dum la kristnaska tago 1942, mi "eniris la Mondon" en Ĝenevo, kie mi sekvis miajn tutajn lernojarojn ĝis la komerca lernejo. Inter 1968-1969 … studado en Usono. Revenante mi laboris en la *Internacia Telekomunika Unio* (ITU). Poste Parizo … biosperto, Londono … refleksologio, Usono … kineziologio kaj ekde 1980 praktikado en Neŭŝatelo, Berna Ĵuraso. 1997: reveno al Laŭzano por instrui "alternativaĵojn" ĝis fine de 2017 … mi finfine "emeritiĝis".**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mia patrino parolis al mi pri esperanto, kiam mi junaĝis, sed ŝi neniam studis ĝin.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**1966: mi sekvis kurson de Claude Piron en Ĝenevo. 1984: KCE. 2018: kurso de Francisko en la *"Dezerta Domo"*.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Nenion, ĉar delonge mi "banas" en la medio vegetarana kaj de la naturaj medicinoj.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Ne … neniu.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**En 1985, dum mia staĝo en KCE, mi konatiĝis kun Ueli Haenni. Ni decidís partopreni la 70-an UK-on en Augsburg (Okcidenta Germanio).**